

63-a jaro n-ro 174 2022/2

la lampiro



**Hilma
af
Klint**

Quer aprender Esperanto?



pma.esperanto.org.br

Enhavo

- 4 | Vortoj de la redaktanto
Militvirusa manio
- 5 | Vortoj de la prezidanto
Ĝoje vidi vin apude
- 6 | Kino kaj aliaj artoj
Hilma af Klint
- 8 | Movado
JESP kunsidas kaj organiziĝas
- 10 | Iom da Filozofio
La mistero de la amo kaj ties
rilato kun la devo
- 12 | Sana vivstilo
Danĝeras ekologia frakaso:
malapero de la abeloj
- 14 | Virtuala fenestro
EASP laboras rete: ĉu vi aprobas?
- 15 | El mia ĉiutaga vivo
Urgajn helpojn
- 16 | Recenzo
Cigana romancaro
- 18 | Por via medito
Mallonga historio de
la malhumaneco
- 21 | Moderna vivo
Provu tion: ke vi ankoraŭ vivas!
- 23 | Alilanda fenestro
Omaĝe al Ukrainio
- 26 | Opiniangulo
Esperanto estas paca agado
- 28 | Iom da gramatiko
Lingva respondo de F. Welchsler

Kovrilbildo: Hilma af Klint



63-ajaro n-ro 174 2022:2

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José Roberto Tenorio

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2022

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Militvirusa manio

Unu katastrofo finfine cedas, eĉ se tre malrapide: la kronvirusa pandemio. Alia katastrofo neatendite, absurde ekfuriozis: la militvirusa manio. Kruele suferas la ukraina popolo, kaj la tuta mondo angore akompanas la tragedion. El ĉiuj mondopartoj aŭdiĝas krioj: “Ĉesu! Ĉesu! Haltigu pafadon!”. Ni aldonas nian modestan voĉon al tiu kriado. Ni aldonas nian simplan esprimon de solidareco per publikigo de artikolo de samideano Viktor Paiuk en

ĉi tiu numero de nia revuo. Kore ni bonvenigas lian tekston kaj la ukrainan himnon, kun la ĉiama devizo: Esperantistoj estas pacemaj!

Bonvenon ankaŭ al nia samideano Vicente Sales, kiu premieras en niaj paĝoj per pensiga artikolo pri humanismaj ideoj. Bonvenon! Ni atendajn pliajn kontribuojn!

Bonan legadon!

Paulo Sergio Viana

VIRTUALA RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA VALO

01/05/2022 je 10h per GMeet

Petu la ligilon ĉe audinorashi@gmail.com

Ĝoje vidi vin apude

Saluton al ĉiuj geamikoj!

Estas tre granda ĝojo ĉeesti en ĉi tiu movado, kun la espero pri tagoj pli bonaj. En unueca estonteco ni estu feliĉaj ĉe familioj, geamikoj, genajbaroj, ktp.



Prezidanto de EASP

Estas tre granda ĝojo ankaŭ vidi vin apud ni, alportantaj solvon por daŭrigo de nia EASP. Ni kaj ĉiuj membroj de la direktoraro, nia konsilantaro kaj kunlaborantoj deziras al ĉiuj fruktodonan vivon.

Ni ne estas tute kontentaj kun la nuna stato de nia asocio, sed ni faru pli bonajn paŝojn laŭ la disponeblaj rimedoj. Ni obstine laboros, laŭ niaj kondiĉoj, por pli bona konstruado, kun partopreno de ĉiuj, kun via kunlaborado, kun viaj kritikoj. Ni bezonas ĉies helpon!

Sendu al ni viajn spertojn, viajn proponojn, eventualajn projektojn por kreskado de nia asocio! Diru al ni, kion vi atendas de EASP!

Kaj mi petas, ke vi akompanu nian laboron en la virtuala mondo, kaj kontribuu per viaj opinioj.

Bonan rekomencon en nova fazo post la pandemio.

Dankon al ĉiuj!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

Hilma af Klint

Mi malofte verkis pri arto inter miaj artikoloj por La Lampiro, tial mi decidis ke, laŭ la eblecoj, mi parolu pri kelkaj specialaj virinoj en kampo de arto. Ĉi-foje la omaĝita estos – Hilma af Klint.

Ŝia patro estis Victor af Klint, mara armeisto, kaj ŝia patrino estis Mathilda af Klint.

Hilma af Klint naskiĝis en la sveda urbo Stokolmo, en la 26-a de oktobro 1862. El ŝia familio, ŝi elprenis la interesiĝon pri botaniko kaj matematiko – kio multe influis en ŝia artumado.

Apenaŭ 20-jaraĝa, ŝi estis akceptita ĉe la Reĝa Akademio de Arto de Svedio. Tie ŝi ĉefe studis desegnadon, pentradon de fotoj kaj de pejzaĝoj. Post gradiĝo kun multe da laŭdo, ŝi gajnis stipendion por daŭrigi sian studadon ĉe grava studio en la centro de Stokolmo en konstruaĵo, kiu en la sveda lingvo nomiĝas “Ateljébyggnaden”.

Ege interesa estis ŝia laboro kiel scienca desegnisto en Bestkuracista

Instituto. Tie ŝi havis oportunon fari multajn studojn pri evoluo, plantoj kaj vivo. Tiu pli “normala” arto estis grava por ke ŝi finance sin subtenu. Ege bela... sed tio kio iĝos “verkaro de ŝia vivo” estos io aparta.

Ŝia fratino forpasis en 1880. Kaj en tiu epoko, la spirita flanko de ŝia vivo multe disvolviĝis alproksimiĝante al Spiritismo. Simbologio, Abstraktaĵoj, Teosofio, Madame Blavatsky kaj filozofio de Christian Rosenkreutz alvokadis ŝian atenton. Kaj ŝi eĉ konis Rudolf Steiner, la fondinton de Antropozofio, kun kiu ŝi renkontiĝis kelkafoje poste dum sia vivo. Ŝiaj verkoj estas ĉefe spiritecaj kaj ŝia artlaboro estas konsekvenco de tio.

Post iom da praktikado pri abstraktaj pentraĵoj, inter 1908 kaj 1915, ŝi ekis serion de pentradoj por Templo, kun paŭzo dum iom da tempo por flegi sian patrinon kiu iĝis malsana. vokita al tiu laboro, ŝi sentis grandan forton, sen duboj pri kion fari kaj sen ŝanĝi ajnan streketon. Ŝi ne sciis kion ili

devis reprezenti, sed laboris kun rapid-eco kaj sekureco.

Konscia pri tio, ke la abstrakta laboro kaj ena signifo de ŝiaj verkoj estis tiom antaŭ ŝia epoko, ŝi sentis, ke la mondo ne estas preta por ricevi tion. Tiam, ŝi esprimis ŝian deziron, ke ĉio estu kaŝe konservata dum 20 jaroj post ŝia forpaso.

Mi estis bonŝanca kapti la okazon en kiu la muzeo Pinacoteca de ŝtato São Paulo, en Brazilo gastigis kelkajn el ŝiaj verkoj dum periodo. Mi admire rigardis ŝian pentraĵojn, kiu estas ja

anime impresa. Mi esperas ke mi iom instigis vin koni pri tiu brila artistino kiu estis pioniro en tiu “moderneca abstrakta pentrarto”. Ĝis la sekva artistino de tiu ĉi serio!

Anna Lobo de Carvalho

Pliaj pentraĵoj de Hilma af Klint videblas ĉe:
https://pt.wikipedia.org/wiki/Hilma_af_Klint



JESP kunsidas - la junularo organiziĝas

Jen por nia granda ĝojo ni ricevis la jenan raporton de Junularo Esperantista de San-Paŭlo (JESP), kiu unuafoje kunsidis subĉiele por ĉarma pikniko, en la Parko “Água Branca”, en la ŝtata ĉefurbo. Bonvenon al la gejunuloj en nia revuo! Espereble ni ricevos pliajn raportojn pri via agado. Ni deziras, ke inter Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj JESP ekkresku fruktodona kunlaboro!



Ni konstruis nian historion dum la pandemio. Dum tiu tempo, estis multe da maltrankvileco, da malfeliĉo, kaj malespero: ni perdis homojn, ni perdis projektojn, sed ni ne perdis la esperon.

La Junularo Esperantista de San-Paŭlo naskiĝis en tiu malfacila tempo, kaj supervivis ĝin, superinte la malproksimiĝon. Kvankam la pandemio ne finiĝis ankoraŭ, tamen la vakcino

portis al ni esperon: tio ebligis la nunan renkontiĝon. Post preskaŭ unu jaro ekde la oficialiĝo de la junularo, Jesp plu ekzista. Ni povis finfine koni nin reciproke, ĉeeste, dank' al la vakcino.

En parko, la muziko, kiu akompanis nin estis la kantado de la birdoj, kaj la vokado de la kokoj ĉirkaŭ ni, kiuj eĉ volis partopreni la piknikon sur la tablo.

Pli ol kunpartigi manĝaĵojn fratece, la plej grava estis babili. Ni povis kunpartigi niajn spertojn, aldoni ideojn al nia junularo, paroli pri la Movado, kaj eĉ pri la vivo. Lingvo estas por tio, kaj ĉio: komunikado.

Ni antaŭĝojas novan renkontiĝon, kiu alvenas proksime en majo, por ke ni konu nin plu, kaj konu pli da esperantistoj. Ni verdigos la Mondon kune, sed vi devos kuniĝi al ni!



Anoj de JESP okaze de sia unua ĉeesta renkonto

* * *

Saluton, mia nomo estas Sarah, mi havas 20 jarojn, mi loĝas en la urbo San-Paŭlo kaj mi estas komencanto.

Tiu renkontiĝo estis por mi tre interesa sperto, mi ekkonis aliajn gejunulojn, kiuj parolas kaj uzas Esperanton en siaj vivoj. Tio estas tre interesa afero, ĝi stimulas min partopreni la movadon kaj tiel pliampleksigi mian amikaron kaj mian kulturon.

JESP estas tre akceptema grupo, same por parolantoj de Esperanto kiel por komencantoj.

Luca Lanzzi
Daniely Silva
Sarah Padovezzi

La mistero de la amo kaj ties rilato kun la devo

mo estas la kulmina virto, tiu, kiu donas sencon al ĉiuj aliaj, sed ĝi estas ankaŭ la plej malfacile komprenebla. Tiel estas, ĉar ĝi estas la virto kun plej multaj gradoj.

Ofte okazas, ke aginto estas certa, ke ion li aŭ ŝi faris pro amo, tamen aliaj ne konsentas, dirante, ke tiu faro ne estas signo de amo. Tio klarigeblas pro la fakto, ke ĉiu havas sian propran koncepton pri la amo, kaj ankaŭ pro tio, ke, abunde aŭ ne, ekzistas amo en koro de egoisto, de krimulo, de indiferentulo, de altruisto kaj de sanktulo.

Krome estas diferencoj pro la diverseco de objektoj. La celo de la ago, la amato, povas esti koramikio aŭ koramikino, edzo aŭ edzino, gepatroj,

gefiloj, geamikoj aŭ iu ajn proksimulo ekster la intima rondo.

Inter ĉiuj virtoj, la amo estas la plej malfacile juĝebla. La kuraĝo, ekzemple, montriĝas klare, kiam iu riskas

sian vivon por savi alian. Simile la humileco estas facile rekon-ebla, kiam iu, kies praveco estas evidenta, cedas al argumentoj de oponanto por eviti perforton. La kuraĝo, la humileco, same kiel aliaj virtoj, evidentiĝas en siaj rezultoj. La malkuraĝulo ne kapablas montriĝi kuraĝa,

la malhumilulo ne povas kaŝi sian naturon kaj ŝajnigi sin humila.

Tute alie prezentiĝas la amo. Ne la ago rivelas ĝian ĉeeston, sed la motivigo de la aganto. Kiso, donaco, portempa flegado de malsanulo aŭ eĉ



tutviva dediĉo por la bono de aliulo povas esti aŭ ne agoj faritaj kun amo. Tiu, kiu vidas la agon elekstere, povas trompiĝi kaj vidi amon tie, kie ĝi ne estas.

Cetere, la aganto scias, aŭ povas scii, se la ago devenas el amo. La decida kriterio estas la grado de libereco entenata en la volo agi. La amo, estante virto, estas libera. Oni agas pro amo kiam ne estas interna puŝo, kiam la motivigo por agi ne estas la devo.

Kiam estas amo en la animo, konscio pri devo estas nenecesa, ĉar agi pro devo estas ne pli ol agi kvazaŭ pro amo. Ĝuste pro tio, la ordono, ke oni amu la proksimulon, esence ne estas postulo, ĉar estas neeble devigi iun ami. Neniu kapablas estigi amon en si mem, ĝi naskiĝas spontane.

Estas homoj, kiuj helpas siajn proksimulojn pro amo, sed tre probable la plimulto, kiu faras la samon, agas tiel

nur pro devo. Tio ne malpliigas ilian meriton, nur vidigas ilian gradon da sinofero. La devo postulas klopodon, la amo ne. La bono farata kun amo ne pezas, ĝi estas plezuriga.

Estas oportune rememori la dialogon inter viro kaj knabino portanta surdorse handikapitan knabon. Li demandis, ĉu ne estas malfacile al ŝi fari tion, kaj ŝi respondis: “Ne, li estas mia frato.” Logika respondo, ĉar ŝi portis lin pro amo, ne pro devo.

Iuj jam diris, ke la plenumado de devo naskas amon, ke farado de bono ripete kaj sinofere iam fariĝas natura, plezura, signante, ke la amo ĝermis. La amo estas tiel mistera, ke estas malfacile konfirmi tion, tamen tiu supozo eblas, kial ne? Povas esti, ke neniam ni scios, kiel aperigi la amon en ni, sed se eblas, ke plenumado de devo estas semo de amo, kostas nenion planti ĝin kaj zorgi, ke ĝi burĝonu kaj kresku.

José Mauro Progiant



Danĝeras ekologia frakaso: malapero de la abeloj

La nombra malaltigo de la abeloj observata en multaj landoj, inkluzive en Brazilo, komenciĝis en Usono en la jaro 2006 kaj titolita “Colony Collapse Desordere”, ekde tiam atingis la tutan Amerikon, regionojn en Eŭropo, Mezoriento kaj Azio. La kaŭzoj proponitaj estas diversaj:

Toksajoj por insektoj kaj fungoj, nutrodeficito ligita al manko de natura florofertoj, klimataj ŝanĝoj, troa ekspluatado de la abelaroj, malgranda varieco genetika, virusoj, fungoj, bakterioj kaj akaroj, kunigitaj aŭ individuaj. Eĉ la poluado far amasa uzado de poŝtelefonoj estis pristudata...

Ĝia malapero atingas negative la abelbredistojn kaj la tutan reton de okupoj bazitan sur ĝi, kies konsekvenco estas pliigo de malsato en la planedo, ĉar ĉirkaŭ 80% de nutrovaroj



dependas de polenizado far abeloj kaj aliaj insektoj. Multaj fruktarboj bezonas la plenan fekundadon por eternigi la speciojn kaj la abeloj estas ĉefaj agantoj tiucele.

Diversaj kulturoj dependas de polenizado por ĉiamigi la speciojn kaj la abeloj plenumas tiun laboron tre bone. La abeloj polenizas ĉirkaŭ 90 tipojn de nutrovaroj komercigataj en la tuta mondo kiel grajnoj, vegetaĵoj kaj fruktoj. Ilia nombro malpliĝas, tiel ke miliardoj da ili mortis kaj la sciencistoj ankoraŭ serĉas la kaŭzojn de la katastrofa okazaĵo.

Plena malapero de la abeloj signifus ne nur senkoloran dieton, sen cerealoj, fruktoj kaj rizo, vestaĵoj sen kotono kaj ankaŭ pejzaĝon malpli riĉan kaj sen fruktarboj, sen ĝardenoj kaj kamparo kolorigita de floroj,

sed la detruon de la nutroĉeno kiu subtenas la birdaron, la sovaĝajn bestojn kaj insektojn, plurfoje kaŭzanta forpelon de aliaj bestoj, tiel kreante ĉenan reagon...

Sciencistoj en Usono trovis 121 malsamajn agrotoksaĵojn en analizitaj abeloj, abelvakso kaj poleno, vekante la kredon ke tiaj venenoj estas la ŝlosilo por kompreno de tiu amas-mortigado.

Eĉ malalta dozo da insekticido, ĉefe la neonikotinoj (kiel imidakloprido), kiuj imitas la efikon de nikotino, mortigas la abelojn. Tamen la produktantoj insistas ke ili estas sekuraj al la abeloj se oni ĝuste uzas ilin.

Sciate estas ke la neonikotinoj plene kontaĝas la plantojn, inkluzive la nektaron kaj la polenon prilaboratajn de la insektoj polenizantaj. Tiel la veneno finfine atakas la nervosistemon de la insektoj kaj la abelaro kolapsas.

La aerpulvorigado terure minacas la abelojn pro ĝia aplikado malobeanta sekurajn agojn postulatajn de la protektzorgemo kaj pro la disradiado for de la plantareo, tiel ke estas neeble protekti ekster la limigita regiono de la plantaro kaj la malmultaj naturaj rezervoj estos neeviteble atingitaj.

Estas raporto pri mortigado de pli ol 10.000 (dek mil) afrikaj abelaroj inter 2008 kaj 2010, en la regiono de la Rio Claro (Ŝtato San-Paŭlo, Brazilo) kaj en la najbaraj urboj. Oni konstatis la ĉeeston de neonikotinoj en 10 procentoj el ili.

En Eŭropo, malgraŭ tio ke la mortigado de abeloj estas malpli intensa ol en Usono, kelkaj venenoj estas tie malpermesataj.

Oni kalkulas je du miliardoj da dolaroj la komercadon de mielo. Jare, aliflanke en la sama periodo, la valoro de polenizada servo (valoro inkluzivita en la produktado de fruktoj pro ĝia produktiva plialtigo) tutmonde estas ĉirkaŭ 300 miliardoj da dolaroj.

Nu, resume, estas evidente ke zorgi pri la sano de abeloj kaj ĝia protektado estas nepre ago kies rezulto atingas la homan sanon...

Espereble, homoj bonvolemaj bonŝance havos unu aŭ du “abelskatolojn” en sia korto kaj profitos plurmaniere la benon de nobla nutraĵo, la mielo, kaj aliaj gravaj produktoj ege utilaj al homa sano. Eblas esplori en Jutubo kaj aliaj prespublikaĵoj detalajn informojn...

Valdemir Moreira

EASP laboras rete. Ĉu vi apogas?

La pandemio estis kaj ankoraŭ estas terura skuo en la vivo de la socioj kaj de individuoj. Multaj el ni devis “reinventi” niajn spertojn. Sed kiel ofte okazas, el baroj kaj ĉagrenoj povas naskiĝi ia nova vivo, plena de ĉarmo kaj valoro.

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo travivis precize tion, kiel ŝtata asocio. Nia sidejo estas fermita jam de pli ol du jaroj, tiel ke nun ĝi postulas riparojn. Nia kaso ŝrumpis, tiel ke niaj monrimedoj danĝere malpliigis. Ni devas urĝe replani kaj reprogrami nian funkciadon kiel asocio, se ni volas pluvivi kaj ne lasi pere la penadon de multaj pioniroj en nia movado, kiuj laboradis por Esperanto dum jardekoj. Unuvorte, EASP travivas malfacilan tempon. Tamen, bela afero estis la vekigo de nia asocio en la virtuala mondo. Jen la iniciatoj, kiuj naskiĝis aŭ mirinde vigliĝis dum la pandemio:

- Kulturkunsidoj: lastan sabaton en ĉiu monato, kun prelegoj disponigataj en Jutubo, sekvata de “debata areno” kun la preleginto;

- Virtuala kafejo: ĉiun sabaton je la 17-a horo;
- Legoklubo Gilbert Ledon: ĉiun unuan kaj trian ĵaŭdon, je la 20-a horo, kun viglaj diskutoj pri legitaj tekstoj;
- Petaloj: fragmentoj de filmoj enhavantaj speciale interesajn citaĵojn, sub la talenta preparado de Audino Rashi;
- Paroligoj: sub gvidado de José Roberto Tenório.
- “Esperanto Noticias”: dulingva bulteno por informo precipe al neesperantistoj, eldonata dufoje en ĉiu monato, skribe kaj parole, en Esperanto kaj en la portugala lingvo;
- Viva Gazeto: kanalo de EASP en Jutubo, kun diversaj rubrikoj.
- La Lampiro: revuo disponebla senpage en la retejo de EASP;
- Zamenhofa Tago, en decembro.

Resume: EASP laboras kaj invitas ĉiujn samideanojn en la ŝtato San-Paŭlo partopreni en nia agado. Cetere: ĉu vi renovigis vian aliĝon? Ni bezonas vin!

(PSV)

Urgajn helpojn

Kiam mi eklernis Esperanton, miaj tri gefiloj ankoraŭ ne estis dek-jaraĝaj. Tiutempe, nur mia dua filino volis iri kun mi al la Esperanta lernejo en San-Paŭlo, ne celante la lernadon mem, sed por promeni kaj esti kun sia panjo. Feliĉe en EASP sinjorino Cecilia gvidis porinfanajn lecionojn kaj mia filino, samnome Cecilia, treege ŝatis la instruistinon kaj la lecionojn. Ŝi lernis multajn vortojn kaj tuj sentis sin komforta iomete paroli kaj multe kompreni.

La tempo pasis. Mi neniam devigis iun el ili lerni Esperanton, tamen ili vidis mian intereson kaj dediĉon dum multaj jaroj.

Miaj tri gefiloj kreskis. La plej aĝa propravole faris bazan kurson en EASP kiam li estis en universitato. La plej juna neniam partoprenis Esperantan

lecionon, tamen diversfoje li petis al mi instrui lin dum ferioj, kiam li revenis hejmen.



Nu, ĉiuj ni konscias, ke scipovi Esperanton ne estas nepra afero nuntempe. La komunikado bone funkcias danke al aliaj lingvoj, ĉefe la angla. Tamen, laŭ mia sperto, mi rajtas certigi al vi, ke Esperanto estas pli ol nure ordinara aŭ plia lingvo. Per ĝi, miaj gefiloj ekvekigis al solidareco, frateco kaj espero, aŭ almenaŭ ekpripensis tiujn aferojn, kaj ĉiam klopodas agi en la mondo inspiritaj de tio.

Ekzemplo de tio estas kio estiĝas hodiaŭ. Cecilia loĝas en Belgio kaj tie ŝi estras ekan kaj etan entreprenon de liofilizitaj manĝaĵoj produktitaj en

(Daŭrigota sur la paĝo 17)

Cigana romancaro...

CIGANA ROMANCARO

VERKIS: FREDERICO GARCÍA LORCA

ELHISPANIGIS: FERNANDO DE DIEGO

ELDONEJO STAFETO, 1971

Legante ĉi tiun libron enhavantan apenaŭ centkelkajn paĝojn, mi ne povis ne memori la proverbon: “Rafinitaj parfumoj foje troviĝas en etaj ujoj”. Fakte, ĝi estas altnivela literaturo. Ne estas facile klare distingi la veran Poezion disde prozo, ĉar la distingo situas ne en rimo, metriko kaj metaforoj — sed en ia “spirito” de la versoj. Tamen, sufiĉas, ke sentema leganto atente plonĝu en aŭtentan Poezion, kaj li tuj komprenas, kio ĝi efektive estas.

Jen alia valoro de ĉi tiu romancaro: ĝi perfekte transdonas la senton pri tio, kio estas alta Poezio. Romanco estas tradicia hispana poemo. En ĝi la versoj estas plej ofte oksilabaj kaj forte

ritmaj, tiel ke estas plezuro legi ilin voĉe, por pli bone senti la melodion. En la Esperanta traduko, la rimoj estas bazitaj nur sur la akcenta vokalo. La

poemoj do similas al kanzonoj, kaj oni povas tute bone imagi, ke ciganoj ilin povus bele kanti. Abundas metaforoj tre interesaj, ekzemple kiam la poeto uzas kolorojn por elvoki sentojn. Plej ofte la etoso estas tragika kaj esprimas iom romantike la pasian animon de hispanoj kaj de ciganoj. Unu tipa ekzemplo

troviĝas en la komenco de “Somnambula Romanco”:

Verda, ĝin mi volas verda.

Verda vento. Verdaj branĉoj.

La ĉevalo sur la monto


kaj la ŝipo sur la maro.

Kun la ombro ĉe la zono

kaj arĝento-frida gapo,

verda karno, haroj verdaj,

pensas ŝi en la verando.



*Sub cigana lunokularo
la ĉirkaŭo ŝin observas,
sed ŝi vidas nur la vakon.*

La traduko en Esperanto estas mirinde perfekta. Oni legas la versojn facile, flue, preskaŭ sen apostrofoj, sen komplikaj frazkonstruoj. La animo de la romanoj klare elstaras, kun sia parfumo poezia. Jen kiel tipe hispana literaturaĵo fariĝis universala.

La tutan volumeton kompletigas du valoraj tekstoj, kiuj pritraktas la ĉefan enhavon: antaŭparolo de William Auld,

kiu atentigas pri la graveco de la verko kaj de la aŭtoro; kaj “Ĝenerala Super-rigardo” de Fernando de Diego, kiu priskribas la delikatan laboron de la traduko kaj faciligas al la leganto la komprenon pri iuj metaforoj uzitaj de Lorca.

Jen mi ripetas: “Cigana Roman-caro” en Esperanto estas rara parfumo en eta ujo. Se vi amas Poezion, legu ĝin malrapide, atente; se vi ankoraŭ ne familiariĝis kun Poezio, legu ĝin malrapide, atente. Vi perfekte eksentos, kiel bela povas esti Poezio.

(P.S.V.)

Daŭrigo de la paĝo 15 (Urgajn helpojn)

norda regiono de Brazilo. Pro la malfeliĉaj faktoj kiuj okazas en Ukrainio kaj pro la kompatinda situacio de personoj kiuj estis devigitaj foriri el siaj loĝejoj, ŝia entrepreno Space-A donacis kvin milojn (5000) da sufiĉe nutraj manĝaĵoj por esti disigitaj al la bezonantoj, kiuj alvenas en la limoj de la lando.

Nu, verdire estis ŝia estonta revo malpliigi la malsaton en la mondo, ĉefe en Afriko. Tamen la sorto decidis por ŝi, eĉ antaŭ ol la plena solideco kaj kresko de la entrepreno. Nun, ŝi tage

ricevas afliktajn petojn por pliaj kaj urgaj sendaĵoj, sed la entrepreno ne povas pagi aliajn pliajn kostojn. Pro tio ŝi esperas, ke tiuj, kiuj volas kaj povas kontribui por la sukceso de la venontaj donacoj, kompleze agu.

Esperanto eble ne estas tiel necesa por la komunikado inter la popoloj, sed mi certas, ke por humanitaraj agadoj ĝi ja nepras!

Jen la ligilo:

<https://mallonge.net/refugiados>

Antonia Sobral

Mallonga historio de la malhumaneco

Ĉiuj bestoj, en nepreciza senco, militas. Ne ĉiam estas rekta konfrontiĝo, sed kiam la porvivaj rimedoj komencas elĉerpiĝi, la bataloj fariĝas pli furiozaj. La venkintoj kutime estas la plej fortaj, aŭ la plej rapidaj, aŭ la plej inteligentaj, aŭ la plej trompemaj, kaj tiuj, kiuj ne kongruas en efika pluvivskemo, pereas.

Goriloj, ekzemple, niaj parencoj proksimaj, pluvivas per kruda forto. Kvankam ili estas vegetaranoj, ili portas armilojn: la minacajn karnovoraj dentojn kaj potencajn muskolojn. Por ili, nur ilia propra familio havas valoron. La maskloj, kiuj estas pli perfortemaj kaj sufiĉe fortaj por akiri manĝaĵon kaj defendi la familion, pluvivas pli longe. Ili ne toleras la plenkreskajn masklojn, nek siajn proprajn virajn idojn, kiam ili fariĝas plenkreskuloj kaj, kun malamo, forpelas ilin. Ili vivas en malgrandaj familioj sub tuta egoismo. La forpelitaj filoj, jam tiom fortaj kiel siaj patroj, vagas tra la arbaro serĉante iun teritorion por

invadi kaj stabiliĝi. Kiam unu el ili trovas vundeblan familion, ĝi invadas la teritorion, mortigas la eks-potencan gvidanton kaj, ĉar ĝi eĉ ne volas esti duonpatro, ĝi ankaŭ mortigas la idojn. La gorilinoj, kun duono de la forto, ne havas ŝancon por defendi siajn idojn kontraŭ la infanmurda brutulo kaj submetiĝos al ĝia perforto, kaj naskos ĝiajn novajn filojn, kiuj heredos genetike la saman brutecon kaj plu-vivos, se ili sukcesos ripeti tiun ciklon. Kion fari? La besta naturo estas tia.

La Homo sapiens, tamen, evoluis alimaniere. Malforta kaj sen la armiloj: la ungegoj kaj karnovoraj dentoj. Ili heredis la toleremon. Sen la minacaj dentoj ili disvolvis la amikan rideton. Sen troiga egoismo, ili lernis kunlabori kaj kunvivi kun siaj samuloj. Sen la konkuremo kaj malamemo, ili disvolvis la amon, kiu transiras la familiojn. Tio permesis al ili formi grandajn komunumojn, disponigis sinergion en ĉasado kaj protektado de familioj, kaj iliaj virtoj, super la puraj bestaj ins-

tinktoj, kondukis ilin al la plej bona kapablo postvivi en la bestregno. Per virtoj, kiel boneco, empatio, kompato, solidareco, frateco, ktp., kiuj diferencigas la homojn de aliaj bestoj, ilia populacio ne ĉesis kreski, disvastigante, kiel genetikan heredaĵon, ĉiujn virtojn, kiuj kondukis ilin al tiu sukcesa rezulto. Kiam la rimedoj fariĝis nesufiĉaj por nutri la kreskantan populacion kie ili vivis, grupoj retiriĝis por serĉi aliajn teritoriojn. Ili preferis eliri amike ol batali kontraŭ siaj samuloj. Kaj tiel, la homo multiĝis kaj disvastiĝis tra la planedo, okupante kontinenton post kontinento. Antaŭ la formiĝo de la unuaj agrikulturaj setlejoj, homoj jam okupis la tutan planedon. Tio estus neebla por iu ajn besto, kiu estante egoisma kaj konkurenciva, kiel leonoj kaj goriloj, markus sian teritorion kaj batalus ĝismorte por ne malproksimiĝi el siaj nutraj fontoj.

Oni ne povas aserti, ke homoj ĉiam estis militemaj, sed la kreskanta populacio kaj la postulo je teritorioj sufiĉis por ekperei aliajn bestajn loĝantarojn, en la loko kie ili alvenis, inkluzive de tiuj de niaj kuzoj Neandertaloj, Denisovanoj kaj aliaj homaj specioj, kiuj kunekzistis dum iom da tempo. Eble mankis, al tiuj niaj kuzoj, la virtoj, kiuj favoris la formadon de grandaj kunlaboraj grupoj. Tiaj okupadoj daŭ-

ris dum jarmiloj kaj, eĉ nekonscie, ili forpelis bestojn kaj detruis arbarojn, sed sen militoj.

Sed ekde la unuaj agrikulturaj setlejoj, antaŭ ĉirkaŭ 120 jarcentoj, komenciĝis la limigado de teritorioj kaj, sekve, la neceso defendi ilin. Tiam komenciĝis, post almenaŭ 1000 jarcentoj da virta ekzistado, certa reveno al la besteco. Ne plu ekzistis malplenaj teritorioj por iri kaj la renkontoj de nomadaj popoloj kun iuj jam establitaj popoloj fariĝis neeviteblaj. Principe, eksteruloj estis akceptitaj amike, kiel registrite en la La Letero de Caminha⁽¹⁾, kiam la brazilaj indianoj ricevis la unuajn portugalajn homojn, sed venis tempo, kiam la malespero, kiu trafis iujn retiriĝantojn, devigis ilin batali, kiel skribite en la Biblio, kiam Dio ne plu estis la Sinjoro de la Homoj,



Letero de Pero Vaz de Caminha

ĝi fariĝis Sinjoro de Militistaroj, ĉar ne estis plu neokupitaj teritorioj en la mondo kaj la “Promesita Lando” ne estis trovita.

Antaŭ almenaŭ 40 jarcentoj, jam estis pluraj civilizacioj sur la planedo kun urboj dense loĝataj, kreskantaj kaj postulantaj pli da teritorio. Invadante, militante kaj prenante teritoriojn, kelkaj homoj revenis al primitiva bruteco kaj komencis elimini la pacajn vundeblajn homojn, lasante pli da perfortemaj posteuloj kaj metante la militojn kaj la malhumanulojn kiel protagonistojn de la Historio, kiu komencis esti skribita: la Historio de la Malhumaneco.

Nun, je la 120-a jarcento de la civilizacio, homoj klopodas trovi solvon al la konfliktoj disvolvita de la propra malhumanigo de la civilizacio. Ni ne

scias, ĉu la bruteco, maltoleremo kaj malamo, kiujn ni nun portas, estas produktaĵoj de genetika heredo aŭ kultura influo, sed ni nepre devas malhelpi la kreskadon de la stulteco de la kleraj homoj. Ni devas apogi la prosperon de la popoloj en siaj propraj teritorioj, en siaj propraj landoj, kun pli da kunlaboro kaj malpli da konkurenco. La boneco, kiun ni atingis en la unuaj tempoj de la homaro, ne plu estu por la kreskado kaj multobligo de la loĝantaro, sed por la plibonigo de la vivokvalito de ĉiuj. Eble ekde tiam nenio plu pravigos la militojn nek la detruon de la planedo, kaj la homoj dividos pli da solidareco kaj interŝanĝos sciojn, revenigante la homajn virtojn kaj lasante, ekskluzive al la bestoj, la rajton esti bestoj.

Viscente Sales

⁽¹⁾ La Letero de Pero Vaz de Caminha al la Reĝo de Portugalio. Grava historia letero skribita de Pero Vaz de Caminha, oficisto en la floto de Pedro Álvares Cabral, raportante la alvenon de la unuaj portugaloj al Brazilo kaj la unuajn kontaktojn kun la indiĝenoj, kiuj vivis en la plej primitiva naturo.

Bibliografio:


- La Biblio
- Macaco Pelado (Nuda Simio) – Desmond Morris
- História do Homem nos Últimos 2 Milhões de Anos (Historio de Homaro en la Lastaj 2 Milionoj da Jaroj) – Selecções do Readers’ Digest
- Etologia: a Conduta Animal, Um Modelo para o Homem? (Etologio: Besta Konduto, Ĉu Modelo por la Homaro?) – Klaus Thews
- A Carta de Caminha (La Letero de Caminha al la Reĝo de Portugalio) – Pero Vaz de Caminha
- A Origem das Espécies (La Origino de Specioj) – Charles Darwin

Provu tion: ke vi ankoraŭ vivas!...

Nekredeble, sed estas vere, ke la registaro de Brazilo postulas ke la emerititaj publikaj funkciuloj kaj ties pensidependantoj pruvu, ĉiujare, ke ili ankoraŭ vivas!... (sub minaco bloki vian ŝvitplenan monatan salajron aŭ pension). Kaj la Registaro tuj publikigas en “Diário Oficial” (Oficiala Ŝtata Ĵurnalo) la liston de “malobeintoj”. En tiu ĉi monato marto, nia Sindikato telefonis al mi, avertante ke mia nomo estas en tiu listo, kvankam mi estis irinta al la banko en la ĝusta dato, kaj en la banko oni informis al mi, erare, ke sufiĉas la biometrio. Kaj mi iris denove al mia bankagentejo, por ricevi “paperan atestilon” (sen subskribo kaj sen dato...). Tamen, ŝajnas ke tiu “papera atestilo” valoras.

Nekredeble, ke por fari tiun pruvon, ne sufiĉas, ke vi iru al bankaŭtomato kun la dekstra mano malfermita al la testo biometria... La aŭtomato liveras al vi monon, sed tio ne pravas, ke vi vivas... (mortinto ne prenas monon en bankaŭtomato!).

Same, ne sufiĉas, ke vi telefonu al la banko kaj interparolu kun la bank-administranto de via konto, tute ne! Kvankam mortinto ne interparolas kun vivulo (krom mediume, laŭ kredo de Spiritistoj). Vi estas devigata fizike iri al bankagentejo, portante identigilon kaj dokumenton “pruvantan la lokon kie vi loĝas”... Antaŭ kelkaj jaroj, oni postulis ankaŭ, ke vi pruvu ke vi estas balotrajtulo kaj plenumis viajn civitanajn devojn dum la lasta balotado... (sub minaco bloki vian ŝvitplenan monatan salajron aŭ pension).



Tiuj malsanegaj postuloj ĝenas ĉiujn, kiuj kuraĝis emeritiĝi, aŭ kies edz(in)o emeritita mortis lasante al la postvivanto pension. Sed tio ĝenas multe pli la plejaĝulojn kaj la plej malsanajn, kiuj havas, kompreneble, malfacilegon translokiĝi al banko. Sed tiuj plejaĝuloj kaj malsanuloj translokiĝas, ĉar ili estas sub minaco, ke oni bloku ŝlian⁽¹⁾ ŝvitplenan monatan salajron aŭ pension.

Kiu decidis loĝi eksterlande, tiu havas ankoraŭ plian problemon: ŝli devas nomumi prokuriston, por ke tiu ĉi atestu, ke ŝli vivas... Lia atesto valoras pli ol mia biometria pruvo ĉe bankaŭtomato... Temas pri plia burokratia kompliko. Kial valoras nur la “vorto” de prokuristo, nomumita ĉe Notario, kaj ne la “vorto” de bankkont-administranto?

La pravigo kiun oni prezentas por provi akceptigi tiujn frenezaĵojn estas la multego da fraŭdoj. Sed fakte por ekstermi tiujn fraŭdojn oni punas la honestulojn... Oni punu la krimulon, ne la honestulon! Tie ĉi oni renversas principon de Juro, kiu diras ke oni ĉiam kaj nure devas pruvi ies kulpon, ne ies mankon de kulpo. Mi ne estu devigata pruvi ke mi ne estas krimulo!

Mi loĝis en Bolivio dum du jaroj, kaj mi logike pensis: anstataŭ translokiĝi

al Brazilo por pruvi ke mi vivas, mi iros al la Konsulejo de Brazilo en Bolivio. Kaj mi faris tion. Tie mi akiris, kontraŭ signifa kosto en dolaroj, skriban atestilon dirantan al mi ke mi vivas... Mi, esperplena, demandis: Ĉu vi informos al la Registaro de Brazilo, ke mi vivas? Aŭ almenaŭ vi sendos al Brazilo tiun dokumenton? Kaj la Konsulo respondis: NE! Vi mem devas sendi ĝin al Brazilo, ni ne faras tion...

Ĉar la Poŝto en Bolivio estas multekostega kaj ne bone funkcias, mi decidis iri persone al banko en Brazilo, kaj solvis la problemon, post multaj suferaj horoj da vojaĝo, tien kaj reen... (La transporto en Bolivio ankaŭ estas treege suferiga).

Sed, finfine, oni ekvidas lumradion en tiu ĥaoso.

“*Diário do Nordeste*” (Nordorienta Tagĵurnalo), de la 14-a de marto 2022, publikigas jenan anoncon:

“La prezidanto de la Nacia Instituto de Socia Sekureco (INSS), José Carlos Oliveira, informis ĉi tiun merkredon⁽²⁾, ke la emerito ne plu bezonas iri al la banko por efektivigi la pruvon de vivo. Nun, la registaro uzos aliajn specojn de datumoj por konfirmi, ke la persono vivas.

(Daŭrigota sur la paĝo 25)

Omaĝe al Ukrainio

Antaŭ nelonge usona himno “La Stelplena Standardo” estis konsiderata la plej populara himno en la mondo. Nun, pro la heroa batalo de ukraina popolo kontraŭ moskoviaj okupantoj, ukraina himno “Ankoraŭ ne mortis Ukrainio” sonas ĉiutage je milhomaj kunvenoj ĉirkaŭ la mondo (de Aŭstralio ĝis Kanado) pro subteno de paco en Ukrainio.

Ankoraŭ ne mortis Ukrainio

Ne jam mortis Ukrainio, nek liber’, nek gloro,
Kaj ankoraŭ al ni, fratoj, venos sortfavoro.
Kvazaŭ ros’ sub sun’ pereos malamikoj fiaj,
Tiam, fratoj, ni ekmastros Patrolandon nian.

Ref.: Niajn korojn ni oferu sur liberaltaron,
Pruvu, fratoj, ke ni estas la kozakidaro!

Ek al sangbatalo, fratoj, de Sjano ĝis Dono,
Ke ne estu l’ Patrolando je fremduldispono.
Nigra maro tiam ridos, ĝojos Dnipro-avo,
Kaj ankoraŭ Ukrainio bonan sorton havos.

Vervo kaj labor’ fervora plibonigos ĉion
Kaj eksonos liberanto en Ukrainio.
Trans Karpatoj ĝi reeĥos kaj al step’ parolos,
Ukrainia glor’ vastiĝos inter la popoloj.

Tekso: Paŭlo Ĉubinskij

Tradukis: Viktor Jaskovec kaj Volodimir Pacjurko

Pavlo Ĉubinskij (1839-1884) naskiĝis la 15-an de januaro 1839 en bieno proksime Borispolo (kie nun estas Kijiva internacia flughaveno) en neriĉa nobla familio.

Post la fino de II-a Kijivo-gimnazio li ekstudis juron en Petersburga universitato. Dum la studentaj jaroj Pavlo partoprenis agadon de Sankt-Peterburgo ukraina komunumo, estis aŭtoro de revuo “Osnovi”, kie li renkontiĝis kun Taras Ŝevĉenko, Mikola Kostomarov. Post mitingo kontraŭ masakro super partoprenantoj de var-sovia manifestiĝo P. Ĉubinskij estis forpelita el la universitato kaj dum certa tempo vivis en vilaĝo apud Ĉernihivo.

En 1861 li doktoriĝis pri jurisprudenco en Peterburga universitato.

Reveninte al Ukrainio dum 1861-62 li verkis artikolojn por “Osnovi”, kun-laboris kun ĉernihiva kaj kijiva gazet-aro. En ĉi tiu tempo li provis malfermi liberan kampanan lernejon en Borispol, sed ne ricevis permeson de aŭtoritatoj. 1862 en Kijivo kelkaj ukrainaj rondoj unuiĝis en la societon “Hromada”, kontraŭ kiu estis ekprocesita krima kazo.

Tiam (aŭtuno de 1862) Pavlo Ĉubinskij verkis poemon “Ankoraŭ ne mortis Ukrainio”, kiu fariĝis Nacia himno de l’ ukraina popolo. Laŭ oni-diroj, li partoprenis festeton, dum kiu serbaj studentoj de la Kijiva universitato kantis patriotan kanton, menciante caron Stefan Dusan kaj ĉantante la vortojn “срце бије и крв лије за своју слободу” (*serbe*: koro batas kaj sango fluas je nia libero). La kanto tre plaĉis al Ĉubinskij, kaj li subite foriris

en alian ĉambron, kaj duonhoron poste li revenis kun la finita teksto de la kanto “Ankoraŭ ne mortis Ukrainio”, kiu tuj estis kantita laŭ la serba motivo. Kelkaj esploristoj opinias, ke la motivoj de la mazurko “Jeszcze Polska nie zginęła,” (*pole*: ankoraŭ Pollando ne pereis), kiu poste iĝis la pola himno, ankaŭ in-



Pavlo Ĉubinskij

fluis la verkadon. Pavlo Ĉubinskij verkis poemojn “à la Ŝevĉenko”.

Post adopto de Valueva cirkulero pri malpermeso de ukraina lingvo (1863), rezulte de kaŝobservado li estis sendita por setlejo en Arkangelska gubernio. Dum ekzilo li partoprenis en historia kaj statistika pristudo de regiono: danke al personaj kvalitoj

okupis diversajn postenojn en la gubernia statistika komitato (enketisto, komitata sekretario, gazetredaktoro, oficisto ĉe guberniestroj pri specialaj taskoj); kapis stud-ekspedicion tra Peĉora regiono kaj Arkta Uralio, iniciatis ekspedicion al Nova Zemlo.

En 1869 li ricevis permeson por reveni al Ukrainio kaj kapis etnografian kaj statistikan ekspedicion de Rusia geografia societo en la Sudokcidenta

regiono. 1873-1875 – sekretario, 1875-1876 – vic-estro de Sudokcidento fako de Rusia geografia societo.

En 1876 li estis denove forpelita el Kijivo, sed ricevis permeson vivi en Peterburgo.

En 1879 P. Ĉubinskij serioze malsanis, emeritiĝis. Mortis la 17-an de januaro 1884 en sia gepatra vilaĝo.

Viktoro Pajuk

Daŭrigo de la paĝo 22 (*Provu tion: ke vi ankoraŭ vivas!*)

La procedo ankoraŭ ne havas daton por ekvalidi. Laŭ Oliveira, se la registaro ne trovas freŝajn datumojn pri la persono, ĝi iros al ŝlia loĝejo por la biometria testo.

Ankaŭ laŭ la prezidanto de INSS, nuntempe 36 milionoj da brazilanoj vojaĝas por prezenti la pruvon de vivo. Inter ili, ĉirkaŭ 5 milionoj havas pli ol 80 jarojn.”

Bedaŭrinde, tiu novaĵo validas nur por INSS, ne por PREVIRIO (Instituto de Socia Sekureco kaj Asistado), kvankam INSS kaj PREVIRIO ambaŭ apartenas al la sama lando, Brazilo.

Célio Freitas Martins

⁽¹⁾ NdLR: La Lampiro ne subtenas tiajn novaĵojn kiel “ŝli/ŝlia” sed respektas la esprimrajton de la artikolisto.

⁽²⁾ <https://mallonge.net/prova-de-vida>

Esperanto estas paca agado

Dum tiuj tempoj kiam la plej bona respondo estas la atako, aplaŭdata de la plimulto da “amikoj”, Esperantujo helpas la viktimojn de la milito!!!

Nia rotaria kunulino **Malgorzata KOMARNICKA**, el Polujo, ĉe Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, Societo Nasze Rio, Societo Hortus en kunlaboro kun la Urba Centro de Socia Helpo kaj kun paroĥo de Sankta Jadviga, krom la Asocio de Pola Skoltaro Zlotoryja, Fondaĵo Animus, Volontula Fajrobrigado, grandaj kaj malgrandaj firmaoj kaj oficejoj, ariĝis por helpi la milionojn da homoj (precipe virinojn, junulojn kaj infanojn) viktimitajn de la kruela milito en Ukrainio. Ili estas nun la rifuĝantoj de la milito. Dum du semajnoj du milionoj da homoj trairis la landlimon al Polujo, la najbara lando, kiu hodiaŭ estas la granda espero al ili! La vintra eŭropa temperaturo en Polujo iĝas unu plia malfacilaĵo al la rifuĝantoj. La mondo helpas la rifuĝantojn sed iliaj necesoj kaj bezonaĵoj estas gigantaj pro la



nombro da familioj!!! Ekzistas ankaŭ la problemo pri la komunikado pro la malsimilaj lingvoj.

Pro ĉiuj malfacilaĵoj supre, S-ino Komarnicka petas, ĉikune, rimedojn por helpi la rifuĝantojn.

Legu la leteron de ŝi, bonvolu!!!

UKRAINIO. GRAVE!!!

NI BEZONAS VIAN SUBTENON

Ĉiutage venas al nia regiono kelkdek ukrainaj familioj kun infanoj. Ni ne volas

resendi iun ajn. La skalo de la bezonoj kaj de la agadoj estas grandega. Ekde la tago, en kiu eksplodis la milito, ni kondukas en Złotoryja (Malsupra Silezio) subtenejon por la alvenantaj rifuĝintoj kaj kolektas materialajn kaj financajn donacojn por ili. Ni subtenas la venantajn familiojn, helpante al ili trovi tranoktejojn, gastigejojn kaj memstarajn loĝejojn. Ni jam disdonis multegajn vestojn, manĝaĵojn, korpopurigilojn, meblojn, matracojn ktp. La Eŭropa Centro de Interkultura Edukado aliĝis al la helpokampanjo gvidata de la Societo Nasze Rio kaj Societo Hortus en kunlaboro kun la Urba Centro de Socia Helpo kaj kun la paroĥo de s-ta Jadwiga. Konstante aliĝas aliaj organizaĵoj kaj institucioj: Asocio de Pola Skoltaro Złotoryja, Fondaĵo Animus, Volontula Fajrobrigado, vilaĝaj municipoj de la Złotoryja-distrikto, lernejoj, antaŭlernejoj, grandaj kaj malgrandaj firmaoj kaj oficejoj. Ĉar ĉiam pli novaj familioj alvenas sen ajna havaĵo kaj estas direktataj al ofte tute malplenaj aŭ nekomplete ekipitaj loĝejoj, ni URĜE bezonas praktike ĉion. Ni donas helpon ne nur ene de la urbo, sed ankaŭ de la tuta distrikto, pri-servante la venintojn dislokatajn en diversaj lokoj de nia regiono. Estas kreita loka

HELPOFONDUSO. Ĉiuj arigitaj monrimedoj estas destinitaj nur por helpo al rifuĝintoj el Ukrainio, ekskluzive por aĉeti nemalhaveblajn aĵojn, medikamentojn ktp.

Numero de la konto por pagoj: Santander Bank (Stowarzyszenie Nasze Rio) 39 1090 2095 0000 0001 4274 0265

Datumoj por eksterlandaj ĝiraĵoj:
currency: PLN IBAN:

PL39109020950000000142740265

SWIFT-kodo de la banko: WBKPPLPP,
bank: Santander Bank Polska S.A. al.
Jana Pawła II 17, 00- 854 Warszawa,
country: Poland

Pagante, ni alskribu la vorton “Esperanto”, **por ke estu sciata, kiel granda estas la verda koro.** Senĉese estas ĝisdatigitaj informoj koncernantaj niajn agadojn: <https://www.facebook.com/groups/149314787378009>

Ni aliĝu al la kampanjo „**NI KUNE POVAS PLI MULTE**”!

Małgosia Komarnicka

Prezidanto de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
Elżbieta Karbowska

Sekretario de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

João Otávio Veiga Rodrigues

PDG 2016/2017 - D4560 Rotary International
Sekretario de Rotaria E-Klubo de Esperanto-Brazilo

Lingva Respondo de Francisco Welchsler

Demando

Ofte oni dubas pri la uzo de prepozicioj de aŭ pro post certaj verboj. Kiun elekti, ekzemple en la jenaj esprimoj? *Morti pro/de KOVIM-19. Malsaniĝi pro/de diabeto. Rideti pro/de kontento. Kriegi pro/de kolero. Fali pro/de ebrieco. Plori pro/de malsato.*

Respondo

La prepozicion pro ĉiam eblas uzi, ĉar ĝi povas indiki kaj motivon kaj kaŭzon. La prepozicion de eblas uzi nur por indiki kaŭzon. La distingo inter kaŭzo kaj motivo estas iom subtila, kaj ne ĉiam estas klare, pri kiu el la du temas.

La vorto motivo povas havi, laŭ PIV-2020, tri signifojn, sed nur la unua estas aplikebla ĉi tie: *tio, kio igas personon agi, konduti tiel aŭ tiel*. Do temas pri ekstera faktoro, kiu influas konduton. Aliflanke, kaŭzo estas faktoro, kiu rezultigas ian fenomenon.

Ĉar la prepozicio de havas multajn signifojn (entute 13, laŭ PIV-2020),

kelkfoje oni preferas la esprimon kaŭze de, por indiki kaŭzon.

Rilate la ekzemplojn en la demando, oni povas konkludi, ke ambaŭ prepozicioj estas uzeblaj, ĉar oni povas interpreti la frazojn kiel esprimojn de kaŭzo aŭ motivo, do: *morti pro/de KOVIM-19, malsaniĝi pro/de diabeto, fali pro/de ebrieco ktp.*; aŭ eĉ: *morti kaŭze de KOVIM-19, malsaniĝi kaŭze de diabeto, fali kaŭze de ebrieco.*

Jen sekvas kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el la Fundamenta Ekzercaro (1909):

Morti pro la patrujo estas agrable. (\$20)
[Motivo, ne kaŭzo.]

[...] li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj **pro** kio ŝi ploras. (§21) [Motivo aŭ kaŭzo.]

Li amas tiun ĉi knabinon **pro** ŝia beleco kaj boneco. (§21) [Motivo.]

Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas **pro** lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon). (§29) [Motivo.]

Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi **de** teruro ne sciis, kion fari. (§ 38) [Ĉi tie Zamenhof celis indiki kaŭzon.]

Li paliĝis **de** timo kaj poste li ruĝiĝis **de** honto. (§39) [Same.]

Mi eksaltis **de** surprizo. (§40) [Same.]

Jen kelkaj kromaj ekzemploj pri la prepozicio *de* en esprimoj indikantaj kaŭzon:

[...] ĝi devos ja nesaveble morti **de** malsato. (Fabeloj de Andersen 1, 1909)

[...] pli granda estis la nombro de tiuj, kiuj mortis **de** la ŝtonoj de hajlo [...] (Malnova Testamento, 1916)

La homaranismo ja nur postulas, ke sian lingvon ĉiu uzu nur por si kaj ne altrudu ĝin al aliaj personoj kaj ke li ne faru el ĝi “idolon”, **de** kio povus suferi aliaj personoj. (Pri la homaranismo, 1906)

[...] kiu restos en ĉi tiu urbo, tiu mortos

de glavo aŭ **de** malsato aŭ de pesto [...] (Malnova Testamento, 1916)

[...] li laŭte ekridis **de** ĝojo [...] (Fabeloj de Andersen 3, 1916)

Ĉiuj ĝojkriis **de** ravo [...] (Fabeloj de Andersen 3, 1916)

Ha, mi ploras **de** ĝojo, [...] (Georgo Dandin, 1908)

[...] la fratino **kaŭze de** enuo kaj **de** malboneco malpacas kun la tuta familio [...] (Marta, 1910)

Kaŭze de konstanta intermiksiĝado de la popoloj, neniu [...] povas scii, al kiu gento apartenis lia prapraavo. (Gentoj kaj Lingvo Internacia, 1911).

[...] difektiĝis la tero **kaŭze de** la fiinsektoj. (Malnova Testamento, 1916)

Kaj la monto Sinaj tuta fumiĝis **kaŭze de** tio, ke la Eternulo malsupreniris sur ĝin en fajro [...] (Malnova Testamento, 1916)

[...] ŝi ridis kaj ploris **de** ĝojo [...] (Fabeloj de Andersen 2, 1916)

Vi mortus **de** ridado. (La Revizoro, 1907)

[...] mi preskaŭ mortis **de** timo. (La Revizoro, 1907)

[...] tiu mortos **de** glavo, **de** malsato, aŭ **de** pesto [...] (Malnova Testamento, 1916)

Kaj jen kelkaj pliaj pri la prepozicio pro:

[...] vi krios **pro** kora doloro kaj ploros pro aflikto [...] (Malnova Testamento, 1916)

[...] ili ploris **pro** ĝojo [...] (Fabeloj de Andersen 3, 1916)

Vi mortos **pro** la virino, kiun vi prenis [...] (Malnova Testamento, 1916)

Mi mem devas morti **pro** la difektita ordo. (La Rabistoj, 1908)

Notindas, ke Zamenhof kelkfoje ankaŭ uzis la prepozicion el por esprimi kaŭzon:

La akuzativo estas enkondukita nur el neceso [...] (Lingvaj Respondoj, 1889-1913)

Dum unuj malamike renkontis nian aferon **el** la kaŭzo, ke [...] la unua lernolibro de nia lingvo, eliris en lingvo rusa[...] (Lingvaj Respondoj, 1889-1913)

Ŝi ploris, sed ne **el** malĝojo [...] (La Batalo de l' Vivo, 1891)

De mallonga tempo mi perdis – mi ne scias **el** kia kaŭzo [...] (Hamleto, 1893).



Rakontaro originale
verkita de
Paulo S. Viana

